

Leterujo, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 481, 1972.12.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Kiel ni jam anoncis, ni ricevis poŝtkartojn kaj leterojn el 28 landoj kaj 5 kontinentoj. Ni komencis saluti niajn skribemajn geaŭdantojn laŭ la alfabeto vico de la landnomoj. Jam la pasintan semajnon ni salutis personojn en Germanio okcidenta. Ni daŭre citadas el la plej interesaj korespondadoj venintaj el tiu lando, en kiu ni havas multajn geaŭdantojn.

A.- Ni salutas doktoron J. Kondor en Lampertheim, kiu raportas pri interŝanĝo de gelernantoj inter Germanio kaj Francio. Aŭskultu :

Cl.-« *Feriis nia filino Bernadette en Ermont/Francujo, apud Parizo, ĉe franca familio. Ŝi revenis kun sia amikino Christine, kiu nun restadas ĉe ni, en Lampertheim, kiel interŝanĝ-lernantino.*

A.- *Ermont estas nia ĝemeligita urbo kaj tiu ĉi interŝanĝo volas servi al la sincera amikeco inter la du popoloj franca-germana. Ĉirkaŭ 40 gejunuloj veturis la 16-an de marto al Ermont kaj la 29-an de marto duobla nombro veturis al Lampertheim, ĉar ĉiuj gelernantoj el Lampertheim kunportis unu amikon aŭ amikino.*

Cl.- *Bernadette estas gaja kaj feliĉa, ke ŝi rajtis partopreni en tiu ĉi unika entrepreno kaj nun ĝoje reciprokas ĉion, kion ŝi en Ermont ricevis. Nature la lingva problemo ne estas tiel solvita, tamen la bona volo al pliproksimiĝo almenaŭ pere de junularo estas laŭdinda ! »*

A.- Kaj doktoro Kondor konkludas : « *Certe alie aspektus la afero, se du diversaj Esperanto-klasoj (franca-germana ekzemple) agas simile! Sed kie estas al tiu ĉi solvo la entuziasmaj kaj kapablaj Esperanto-instruistoj ? »* (Fino de la citaĵo.)

Cl.- Ni scias, ke pere de la interlerneja korespondado similaj interŝanĝoj ekkazis, ekzemple eĉ inter Jugoslavio kaj Britio, kaj inter Brazilo kaj Argentino. Kiel diris doktoro Kondor, estus bone, ke esperanto-instruistoj imitu tiun ekzemplon kaj ĝemeligu sian klason kun alilanda klaso.

A.- Ni salutas sinjoron Ulrich Hoffmann en Berlin, kiu faras tre precizajn demandojn koncerne la romanĉan lingvon, kiu estas parolata en sud-orienta Svislando. Nia radio-kolego doktoro Arthur Baur jam plurfoje prelegis kaj tucerte ree prelegos pri tiu interesa latinida lingvo.

Cl.- Ni salutas sinjoron Günther Becker en Blieskastel, sinjoron Wenzel Weber en Mönchengladbach, nova esperantisto, kiu deziras ricevi informojn koncerne esperanto-vortarojn. La poresperanta libro-peranto en Germanio okcidenta estas sinjoro Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg, Poŝtfako 2113. Ni ripetas : Ludwig Pickel, D-85-Nürnberg, Poŝtfako 2113. Pli bone ol ni, li povos doni ĉiujn necesajn informojn koncerne la nun haveblajn vortarojn por germanlingvanoj.

A.- Dum ni parolas pri libroj, ni salutas sinjoron Klaus Schubert en Hamburgo, kiu petas al ni atentigi niajn geaŭdantojn pri la mizera stato de la esperanta libro-merkato. Ni plurfoje parolis

pri libroj. Nur mankas al ni tempo por kritikeme priskribi la novajn librojn kaj regule legi tekstojn el la plej belaj literaturaĵoj, kiuj karakterizas nian literaturon originalan kaj tradukitan.

Cl.- Ni mem okupiĝas pri la libro-servo de la svisa esperanto-movado. Ni konstatis, ke ni ĉefe vendas, kiam estas organizataj libro-ekspozicioj, kie oni povas trafoliumi, prove legeti librojn. Devus ekzisti en nia movado veturanta libro-ekspozicio, kiu vizitas la grupojn.

A.- Nia publiko estas ofte embarasata. Ĝi ne scias, kiuj libroj estas aĉetindaj. Tro ofte estas vendataj senvaloraj verkoj, mistradukitaj ĉefverkoj. Trompitoj poste hezitas reaĉeti novan fuŝaĵon. Ĉu kulpas pri tiu situacio la publiko mem, aŭ la gvidantoj de la movado ?

Cl.- Esperantio estas komerce dividita en diversaj inter si fermitaj merkatoj. Antaŭ la unua mondmilito René de Saussure serĉis rimedon al tiu situacio. Li imagis la internacian monsistemon **spesmiloj**. Poste la Poŝta Unuiĝo kreis la *internaciajn respondkuponojn*. Post la dua mondmilito Andreo Cseh imagis neŭtralan monon nomatan **Stelo**. Neniu el tiuj tri sistemoj sukcesis. Malsukcesis la unua. Funkcietas en limigita mondo la dua, tio nur por etaj pagoj. La tria eĉ ne ricevis daŭran apogon de la ĉefaj organizaĵoj, kiuj karakterizas nian movadon. Pro tio la libera disvendado de niaj literaturaĵoj ne estas ebla, kio malfavoras la disvolviĝon de originala beletrismo.

A.- Por multaj el ni esperanto estas duaranga lingvo uzata ĉefe por amikaj renkontiĝoj, por supraĵa babilado. Tiu sinteno respeguliĝas en negativa sinteno al ĉio vere altnivela. Kiuj deziras favori la disvolviĝon de nia libro-merkato, tiuj devas mem edukiĝi al vera dulingvismo, kie esperanto estas samnivele lokita, kiel la denaska aŭ lerneja lingvo.

Cl.- Fine de tiu ĉi jaro ni esprimas nian esperon, ke 1973 marku paŝon antaŭen en tiu direkto : vera dulingvismo, kie, por la esperantistoj mem, esperanto estas pli ol hobiaĵo, sed esprimilo samvalora kaj konkurenca al la naciaj lingvoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !